

Giulio Cappa

Sen komentario

Memkritiko, de Victor Sadler, eld. Koko, Kopenhago, 1967, 60 p.

Mi eklernis Esperanton en 1975, dum la soldatservo (tiam en Italio ĝi estis deviga): mia ŝofora tasko lasis al mi libertempon dum longaj atendo-horoj, kaj mi profitis tion interalie studante la meminstruan kurslibron *Teach yourself Esperanto*. Poste mi serĉis la esperantistojn en mia urbo, Romo, kaj havis la bonan ŝancon trafi la junularan grupon, kiun gvidis Renato Corsetti. Mi komencis partopreni renkontiĝojn en Italio kaj aliĝis al la junulara kaj universala kongresoj de TEJO kaj UEA en Greklando. Tie mi eksciis, ke ekzistas la eblo labori en la roterdama Centra Oficejo kontraŭ loĝigo kaj ioma stipendio, kaj, ĉar la plej bona maniero perfektigi lingvokonon estas dumtempe vivi en loko kie ĝi estas parolata ekskluzive, mi min proponis kaj oni min akceptis. Mi komencis mian deĵorperiodon kiel volontulo en la Centra Oficejo de UEA kelkajn semajnojn post la Universala Kongreso en Ateno, do en aŭtuno 1976. La tiama direktoro estis Victor Sadler, sed mi dependis de Simo Milojević, redaktoro de la revuo *Esperanto*, kiu ankaŭ respondecis pri la libroservo. Mi fariĝis libroservisto. Mi troviĝis en la loko kun la plej alta denseco de esperantaj presaĵoj en la mondo, ĉar, krom la libroservaj stokoj, en la domo gastas ankaŭ la Biblioteko Hodler, kaj mi parolis esperanton la tutan tempon, dum la laboro, dum manĝo- kaj kafo-paŭzoj, kun homoj inter la esperantlingve plej kompetentaj en la planedo.

En la libroserva ĉambro mi lernis kiel plenumi la libromendojn kaj metode ĝisdatigi la stokojn. Unu fako ne bezonis reprovizojn, tiu kun la triona rabato. Necesas scii, ke kiam oni mendas ĉe UEA pli ol tri ekzemplerojn el sama varo, oni ricevas sesonan rabaton, krom se temas pri libroj rekte eldonitaj de UEA aŭ kies tutan stokon UEA posedas pro transpreno. Je tiuj ĉi lastaj la mendo de tri ekzempleroj efektivas trionan rabaton. Kiam UEA akiris la restantajn stokojn de la eldonejo Stafeto, ekzemple, gravaj titoloj, kiuj jam delonge ne plu estis haveblaj, subite reaparis en la libromerkato kun la aldona avantaĝo de la triona rabato.

MEMKRITIKO

La trionarabatofako okupis angulon de la libroservo. Malfermita pakaĵo sur ĉiu stoketo montris la enhavon. Mi memoras, ke mi tuj rimarkis la sobran kovrilon de *Memkritiko*, sed tiam mi havis multon por urĝe lerni kaj mian scivolemon tentis senfinaspekta kvanto da tiklaj novaĵoj. Post kelkaj semajnoj, la libron *Memkritiko* iu ŝercalude menciis dum kafopaŭzo, kaj nur tiam mi eksciis, ke la aŭtoro estas tiu silentema brito kiu duonvoĉe priironias kaj firmamane regas la internacian dungitaron.

La libro estas malgranda, bindita per bele lazura tolaĵo kun la titolo orume gravurita grande supre. Ĝin gardas papera kovrilo tute blanka kun nigra titolo. El la interna frontpaĝo ni ekscias, ke ĝin presigis Eldonejo Koko (sen lok-indiko, sed la UEA-katalogo asertas, ke Kopenhage) en la jaro 1967. La moto venas de furora eldonaĵo tiutempa, la ruĝa libreto de maŭzedongaj citaĵoj, kaj tekstas:

*Ni devas deteni nin
de memkontentemo.*

En la antaŭparolo Victor Sadler asertas, ke la poemaron, de nekonata aŭtoro, li malkovris en la UEA-domo en Roterdamo kaj nun prezentas ĝin kun komentario. Li estus do nur redaktoro kaj priskribas la kolekton jene:

La manuskriptoj portis seriajn numerojn de 1 ĝis 98. (...) Mi forsarkis sesdekon. Mi provis ignori la tempan ordon, la datojn kaj numerojn, por munti la tuton de la elektitaj pecoj en ian koheran tuton. (...) La datoj forfalas (la tuta elektaĵo ampleksas proksimume unu jardekon).

Preskaŭ ĉiujn el la 36 poemoj sekvas notoj ĉu pri lingvaj aspektoj, ĉu pri metriko, ĉu por klarigi la enhavon, sed plejparte por severe pritaksi per senkompata kaj mokema antaŭjuĝo la poezian valoron de la versoj. En la komenca poemo la aŭtoro alvokas la protekton de la dioj por ke

*ne delogu min molmama rimo
kalemburo kabareta, aliteracio literlaciga,*

sed tion li faras ĝuste per kalemburoj kaj aliteracioj, kaj rimoj ne tute mankas en la ceteraj poemoj. La komentario kontraŭkantas la versojn kaj parolas al la leganto per alia voĉo, regata de sinteno malfida kaj bagateliga kontraŭ la aŭtoro, ĉiam preta malkaŝi ties neperfektaĵojn, licencojn, reeĥojn el la monda literaturo de Kalocsay al Baudelaire, de Goethe al Auld al Boulton al Ezra Pound al e.e.cummings. La ĉikana

komentariisto, ekzemple, skurĝas pro *manko de sentimento* tiun ĉi delikatan mirindaĵon:

*marton mi mozaikis vorte
por ke ĝi floru
ĉe fratino
fora*

Li mildiĝas iom nur antaŭ la poemo 71, la sola pri kiu li esprimas ian aprobon:

*negranda knabino
kun ventro iom tro mola
kun serpentaj brakoj
mian kranion loĝadas:
fantomo, sub tegmento putra*

Fermas la poemaron la senkomentaria ero 91, kies lasta verso sonas:

Laciĝas mia voĉo, al si mem responda.

Stila apartaĵo de la poemaro estas la rezigno pri apostrofoj. La aŭtoro tute ne utiligas elizion, nek de la artikolo nek de la o-vortoj. Neologismoj ne svarmas, memorindas du proponoj el ekstereŭropaj internaciaj vortoj: *muŝkila* por malfacila kaj *ratnapuro* por juvelurbo.

Evidente Victor Sadler ne vere volis, ke la leganto kredu lin nura redaktanto, alimaniere li ne elektus la titolon *Memkritiko*.

La poemaro plene kongruas kun la samtempa stato de la monda literaturo. Ĝi malhavas sen ia perdo la kutiman malfruiĝon de Esperanto pri forma kaj stila evoluoj. La libro kiel tuto, versoj kaj komentario, estas ĉefverko enviinda de ĉiuj nacilingvaj literaturoj. Bedaŭrinde en *Esperanta Antologio*, dua eldono, ja aperas iuj poemoj elektitaj el *Memkritiko*, sed senigitaj je la respondaj komentoj, kiuj estas ties esenca parto. Eble ankaŭ pro tiu misprezento la libro estas maltro konata en la esperanta mondo, kaj tio pravigas tiun ĉi malfruan atentigon, preskaŭ duonan jarcenton post ĝia apero.

La libroservo de UEA ankoraŭ havas ĝin en stoko: ĝi kostas nur 2,70 eŭrojn, kaj se oni mendas tri ekzemplerojn aŭ pli oni ricevas trionan rabaton.

junio 2014